



# **NORDHUNGARIA INFORMO**

**Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo  
Miskolc**

Aprilo 2008

## Tartalom

APRILLO .....	3
INFORMO .....	4
HUNGARLANDAJ EKSKURSOJ.....	4
Prezento de la Ŝtonfloro Popolkanto-Rondo de Tállya.....	5
Ŝerco.....	7
La festo de punto en Bábolna, la 25-26-an de aŭgusto 2007-a .....	8
Magdalena Mátray.....	11
FESTO DE SANKTA LADISLAO .....	14
HIMNO AL REĜO SANKTA LADISLAO .....	15
HISTORIO DE LA MIŜKOLCA ESPERANTO-MOVADO .....	16
Naturmigrado al Szentlélek (Sankta animo) .....	19
Hungara – Esperantista – Pola Renkonto .....	22
INTERKULTURA DIALOGO .....	22

## APRILIO



Karaj legantoj!

Ĉu ankaŭ vi estas tia, kia la aprila vetero? Kiam la vetero estas nuba, vi ne havas tiun bonan humuron, ol kiam sunradias. Tiam ĉiu estas pli malpacienca, pli incitebla. Oni diras, kiun ne devus. Tiam oni povas perdi la malfortbazajn amikecojn, kaj eblas ricevi fortegajn malamikojn. Ĉio konfuziĝas tiam, kvazaŭ oni ne parolus samlingvon, eĉ ne Esperanton. Facilas forĵeti la belan ideon de Esperanto kaj anstataŭ ĝi vortonĵeti: mi ne rekonas vian agadon, aŭ mi ne amas vin, vi ne interesas min!

**Sed, la 8-a de Aprilo estas la Mondotago de la Homamo.**

Mi pensas, almenaŭ dum tiu bela tago la interkolerantoj devus repaciĝi. Bona estas ĉi tago. Kaj ĉiu tago bonas por ligi amikecojn kaj teni ilin eterna, ĉar la vivo mallongas. Oni devas alte taksi, kiun ni faras po unu kaj kuntenante por aliuloj, por ni ĉiuj. Do, pensu ĉiam pri la homamo! Ni ne povas esti ĉiu, kia estis Julio Baghy, la „homa homo”. Sed, devas provi ĉiu, ke poste aliuloj povu diri tion pri li/ŝi.

*Kion ni festas ankoraŭ en Aprilo?*

El inter la pluraj famaj kaj festotagoj mi emfazas la subajn:

**La 11-a de Aprilo, estas Tago de la Hungara Poezio.** Ĉi tiu bela printempa tago estas la naskiĝtago de la fama hungara poeto Attila József. Liajn poemojn esperantigis niaj du samideanoj: Márton Fejes kaj Imre Szabó.

En Miskolc- Lillafüred oni povas trovi skulptaĵon de Attila József, en Miskolc stratnomo gardas lian memoron.

**La 14-an de Apriloen 1917. mortis Ludoviko Lazaro Zamenhof,** la kreinto de lingvo Esperanto. Lian memoron memortabulo, stratnomo gardas en urbo Miskolc, kiun florkronis la partoprenantoj de la Hungespola Renkonto, la 5-an de .Aprilo 2008-a.

**La 22a de Aprilo estas la Tago de la Tero.**

Ĉi tago estas naturprotektata ago-tago. Ĝia festado ekiris al socia iniciato, el Usono. En Hungario oni aranĝas ĝin ekde 1990. Ĉi tempe oni kutimas gvidi la infanojn en la naturon, por kolekti malpuraĵojn, rubojn – espere, ke la infanoj tiel abomenos la malpuraĵojn, ke ili neniam disĵetados tiujn.

2008 estas jaro ankaŭ de la Tero. Pri tio ni skribos en la maja numero.

## **La 29-a de Aprilo estas la Monda Tago de la Dancarto.**

Al iniciato de la 1981 jara madrida jarkunsido de la Internacia Teatra Instituto, en 1982 oni festis ĝin unue, okaze, ke en 1727 ĉi tage naskiĝis Jean G. Noverre baletisto; la renoviganto de la universala dancarto.

Ĉu vi pensis jam pri tio, ke ankaŭ la danco estas lingvo? Jes, tiel estas. Ankaŭ pri tiu mi skribas en mia eseo, kies titolo estas: **La jaro 2008-a estas jaro ankaŭ de la Lingvo, Lingvoj.**

(Indikojn de la Vikipedio uzante)  
Adrienne, sinjorino Pásztor

## **INFORMO**

### **Hungara Fervojista Esperanto Amikara Renkonto**

„Estimataj!

En la hejmpaĝo de Hungara Fervojista Esperanto Asocio (<http://hfea.uw.hu/index.html>) oni jam povas legi la programon de la ĉijara Amikara Renkonto, kiu okazos en Tata. Krom la programfolio la interesigaĵoj povas elŝuti ankaŭ aliĝilon Serĉu en la hungarlingva versio en la submenuo "Tevékenység". La esperantlingva versio de la programfolio kaj aliĝilo nun estas preparata por viaj eksterlandaj amikoj. Se ankaŭ tiuj estas elŝuteblaj mi tuj informos vin.

Saluton

KRISTÁLY Tibor  
<http://espleono.uw.hu/index.html>  
[kristalyt@t-online.hu](mailto:kristalyt@t-online.hu)”

## **HUNGARLANDAJ EKSKURSOJ**

### **Montosubo-Vinregiono Tálya**

Sur la sudokcidenta rando de la montaro Zemplényi, en la onda valo dividita per flankriveretoj de la rivereto Szerencs (Serenĉ) estas trovebla la setlejo, kiu loĝata estas de plur mil jaroj, laŭ atesto de la arkeologiaj malkovraĵoj. Ĝi estas grava vilaĝo de la „montosubavinerregiono”.

Ĝi situas 10 kilometroj de urbo Szerencs, havas fervojstacion ĉe la Szerencs-Hidasnémeti flugilfervojo.

La nomo de la vilaĝo aperis unue en ĉarto en 1255. La Vallonoj - lokiĝintaj sur ĝian terenon ĉ. la miljarturniĝo (1000), plantis la unuajn vitojn. Ankaŭ la nomo de la vilaĝo estas verŝajne vallondevena, kaj ĝia signifo estas: skribo. Ĝia paroko jam rolis en la papa-dekonojregistro en 1333. La unua fortikaĵo konstruiĝis en nordorienta limo de la vilaĝo. Ĝi iĝis posedaĵo de

Jánoš Szapolyai (Johano Zapoĵai) dum regado de reĝo Mátyás Hunyadi (Matiaso Hunjadi). Dum la interbataloj inter reĝoj Johano kaj Ferdinand Habsburg iĝis la fortikajxo ruina, poste oni disportadis ĝiajn ŝtonojn. La familio Rákóczi posedis la vilaĝon meze de la 17-a jc. La historio de ĝia poŝttrafiko estas rekondukebla al la 14-a jarcento. La malfacila vivsituaĉio de la loĝantaro intensiĝis post 1711 (debato de la liberecbatalo de Francisko Rákóczi), kaj maksimumadis en tempo de la pestoepidemo. Incendio detruis ĝin multfoje. Ĝia industria akceliĝo komenciĝis en 1566, kiam oni plilongigis la trafikvojon Vieno-Kaŝa (la lastaloko nun estas Koŝice en Slovakio) tra Tokaj ĝis Szatmár (Satmar). Ĝia ŝtonminejo ekfunkciis en 1928, certigante pliigitan bonan vivtenon al la loĝantaro. Post la jarcentfina granda filokseroepidemo (neniĝo de vitoj), oni replantis la vitplantejojn. Gáspár Károli (Kasparo Karoli) komencis la bibliotradukon, kaj mortis ĉi tie. En tombejo de Tállya (Taja, akcentu la antaŭlastan silabon) eternripozas Jánoš Lavotta (Johano Lavotta), la „reĝo de verbunkoj”: komponisto de malnovaj hungaraj varbkantoj kaj dancoj. Ĝia barokstila kalvinana preĝejo konstruiĝis en 1753. La fundamentoj de la katolika domo de Dio, estas mezepokdevenaj. En 1802, en la evangelia preĝejo estis baptita Lajoš Koŝuth (Ludoviko Koŝut), la ĉef-figuro de la 1848-1849-a revolucio kaj liberecbatalo. Famas la ĉi-tiea Kelo-labirinto Rákóczi, la nobeldomo Rákóczi. Pluraj belaj konstruaĵoj, skulptaĵoj ornamas, kolorigas la setlejon.

(Laŭ la prospekto de Nordhungaria Turist-agantejo kompilis kaj tradukis Adrienne, Pásztor)

## Kulturo

### Prezento de la Ŝtonfloro Popolkanto-Rondo de Tállya



En vilaĝo Tállya de departemento Boršod-Abauj-Zemplén, antaŭ 22 jaroj fondiĝis la Popolkantorondo „Kővirág” (Kovirag/Ŝtonfloro) kaj ekde 12 jaroj ĝi funkcias kiel Societo. Ekde 2002 ilia setlejo estas parto de la „Montosubo-Mondaheredaĵo”, Ĝi estas loĝata teritorio ekde plurcentjaroj. Ĝi povas danki sian famon al florado de la vinkulturo. Por verkistoj, poetoj, soldatoj, militestroj, pastroj, papoj, ĉiunivelaj kaj ĉiurangaj vintrinkantoj oni plektis legendojn, fabelojn rilate de la vino de Tokaj, kies plej bonan vinberspecion oni rikoltas ankaŭ ĝis nun en Tállya.

La loĝantoj de la setlejo estis ĉiam kaj estas ankaŭ hodiaŭ laboremaj homoj. En ilia konscio estis kaj estas, ke la vino de Tokaj korektas la damaĝojn. Ĝia ebrio elŝprucigas kanton en malvarmeto de keloj, gajigas la animojn. Ĝi ekprosperigas la vinkulturon de ilia setlejo.

Ankaŭ la kantistoj scias, ke tiu realas, kaj ili faras ĉiun eblan por iĝi indaj reprezentantoj de la reputacio.

Ilia setlejo estas riĉa krom sia eksterordinare riĉa-aro vino, ankaŭ koncerne ilian popolaron. Ili zorgeme gardas kaj flegas la popolaron. Admirindaj estas la granda aro de vidindaĵoj; la artobjektoj, la antikvaj konstruaĵoj. La situo de la setlejo magia estas por la turistoj vizitantaj ĉi tien. En nia nuno manreneblaj estas la rekonaj rangoj de la popolkantaj grupoj, ĉefe de la Societo Popolkanto-Rondo „Ŝtonfloro”. Nun tiu jam funkcias kiel Komunutila-Societo. Iliaj membroj estas posedantoj de 14 Lande-Enklasiga „Ora-Grado”, krome de 3 „Ora-Pavo premio”. Ankaŭ siaj soldatkantistoj povas fieri:

Sinjoro Ferenc Kalina: orpremiita, ĉefgvidanto de la Societo, li estas ĝia prezidanto  
Sinjorino Gézáné Papp: 2 arĝentpremioj, posedanto de sonregistrado de Hungara Radio  
Sinjorino Józsefné Turánszki: estas posedanto de rekona-diplomo  
Sinjoro György Nagy (Georgo Nadj): estas gardanto de laŭda-diplomo kaj li estas orgrada kantisto.

La grupo entreprenas taskon stimulan en la kultura tereno; en ilia malvasta ĉirkaŭaĵo, sed ankaŭ sur la tuta teritorio de la lando, pluse ekster niaj landlimoj: egale en Slovakio, Transilvanio, Subkarpatoj. Ili faris vojaĝon, plurfoje en Slovakio; de Košice tra Rožňava (Roĵnjo) al la Malalta-Tatro, ĝis tute al fortikaĵo de Oravský Podzámok (Árvaváralja). Plej lastokaze ili kantadis tra la tuta fermita teritorio de la plaĉeme parolitaj Palocoj (slovakdevenaj Hungaroj). Ĉe Subkarpatoj ili atingis Beregovon, kaj fortikaĵon de Mukaĉevo (Munkaĉ). Ili povas rakonti multajn belajn pri iliaj transilvaniaj trifojaj roladoj. Ili faris vizitojn plurfoje en Rumanio ĉe Tibisko tra Sighetul Marmației (Máramarossziget), ĝis Odorheiul –Secuiesc (Székelyudvarhely). Ili kompensis sian pieton ĉe tombo de Blazio Orbán; la fama verkisto, priskribinto de Sikullando. Aliffoje ili kantis en Cluj-Napoca (Koloĵvar) kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo. Ili atingis la altan fortikaĵon de Deva, de tie tra la Cimpul Piinii (Pano-kampo) al Alba Iulia (Gyulafehérvár en / Rumanio). Ĉie oni akceptis ilin ame, kiel sinceraj amikoj. Ili interŝanĝis siajn kantojn, pensojn, ili teksis amikecojn, kaj multe lernis unu de la alia. Ili konatiĝis kun pasinto, nuno, kulturo, kantoj, kutimoj de unu la aliaj, kiun ili gardas grandestime kaj ame pro akiro de ĉi travivaĵoj ili kompilis sian 2008-an laborprojekton. En 2007, ili denove akceptis grandan defion, ja ili vojaĝis en departamenton Zala, alian landparton, kien ili forportis kantojn kaj bondezirojn de ilia vilaĝo. Ili zorgeme organizis kaj festis sian 20 jaran datrevenon. Ankaŭ iliaj eksterlandlimaj amikoj alvenis por esprimi la bondezirojn. Kaj ili aperigis libron pri mem, titolitan „En plej belan epokon de mia vivo”; en kiu ili priskribis la rezultojn, sukcesojn, eblajn fiaskojn de la 20 jaroj. Ĝin ornamas samtempe ankaŭ riĉa bildaro kaj muziknotarejo. Ankaŭ ilia kompleta sonanta kasedo aperis, kiun pretigis la Hungara radio kun la titolo: „Antaŭ la preĝejo de Tállya.” Ili volonte staras je dispono de la aĉetantoj.

*La prezidanto de societo estas la juna Ferenc Kalina.  
Ili estas tute memkonservadaj, funkciigas sin per konkursoj.  
Iliaj bankkonto-numero estas: 55800037-17000019  
Ili ĝoje akceptos la 1%-on de la ofertitaj impostoj.  
Ilia faka gvidanto, fondinto estas la maljuna sinjorino Ferencné Kalina, kiu estas premiita per la grandpremio KÓTA.  
Ilia atingebleco estas : H-3907. Tállya, Rákóczi u 67. Hungario  
Telefono: + 36 47 398-146*

La devizon - de la kantogrupo – prezentas la admirindaj vortoj de s-ro Lajoš Bárdoš (Ludoviko Bardoš) muzikscienculo, kiujn la majstro persone donis al la gvidanto:

„Nur kantu, ĉar la kanto bonefikas,  
Nur kantu, ĉar la kanto plibeligas,  
Nur kantu, ĉar en la kanto koro batas.”

(La Kantoĥoron prezentis sinjorino Ferencne Kalina – fakgvidantino el Tállya. La prezenton esperantigis Adrienne, sinjorino Pásztor – el Miskolc)

## Ŝerco

### Terura

Du homoj paroladas en drinkejo.

- Terure, kiel mi vivas! Mia edzino ĉiuvespere vizitas drinkejon.
- Kial vi ne eksedziĝas?
- Neeble. Kiu akompanus min tiam hejmen?

### Mi aŭdis en la kafejo

ke la virinoj vestas sin per pantalono por pli simili al la viroj, sed ili surprenaas ankaŭ diafanan bluzon por demonstri ke ili ne estas tiuj.

(Hungara Vivo 1982/5.)

**La festo de punto en Bábolna, la 25-26-an de aŭgusto 2007-a**  
**- Daŭrigo -**  
**Parto III-a**



**LA PUNTO**

„La virina vestaĵo havas tian ornamaĵon, kies regado estas – ni direblus – senbara. Tiu ornamo, de kiu nenio konvenas pli bone por la virina individueco.

Por ĉiu virino, la plej favora vestaĵdetalo iĝos el ĝi; ŝi vivas ĉu florecjune, ĉu grizharare, plenkreskule.

Ni survestas tiu-ĉi ornamon, ni kudras riĉe ĝin sur nian vestaĵon, kaj tamen al multuloj ĝi estas nekonata. Lastatempe, la disvolvo de artsento iĝis sentenco; la gusto rafinadiĝis ĉiu kampe. Nur, kvazaŭ la punto estigas diferencon tiurilate. Kontraŭ la per maŝina puntaro survestitaj pompaj figuroj, tre malmultas tiuj virinoj, kiuj survestas la veran punkton...

... Kvankam la vera punto estas ĝuste tia, kia estas la juvelo, ĝia valoro restas, eĉ ĝi pliiĝas de jaro al jaro...

Ni povas diri, ke ne ĉiu monhavas por la vera punto. Prave! Sed, ni ankaŭ mem povas prepari ĝin. Kaj okupiĝo ne ekzistas pli gracia, kvazaŭ ĝi estus kreita al profesio de rozkoloraj virinaj fingretoj...

Iam ĉiu nobelulino okupiĝis per puntopreparo.

...Ili kunvenis ĉe domo de la noblulo kaj mem la sinjorino instruis ilin al preparo de ĉi ornamaĵoj. La ornamaĵoj de la eklezioj pretiĝis plejparte, en la silentaj monaĥeĵĉeloj. Do, ĉi bela kaj ŝatata manlaboraĵo estis ĝenerala. La noblulinoj direktis fajnguste, la filinoj de la plebo (popolo) enportis sian specifan personecon. Kaj nun, en febro de la vera puntomodo, multaj virinoj apenaŭ povas diferencigi la punto-specojn unu de alia.”

La supra citaĵo aperis en 1909, en la sciencpopulariga kajero de la Metiarta Muzeo. La artikolon verkis Bella Sárosi (Bella Ŝaroŝi), kaj ĝia titolo estas: „La pasinto kaj nuneco de la Punto.” Ni povas formuladi ĉi pensojn ankaŭ nuntempe, sed la forpasintaj du jardekoj multe transformiĝis, ja en publika konscio iĝis akceptitaj la beleco de la manfarita punto, krome ĝia loko en rondo de la teksornamaj teknikoj. Niatage, ja antaŭon de 21-a jarcento, per preparo de la punto, per pli ol 10-15 specojn da tehnikoj ni konatigas la junularon kaj plenkreskulojn, en kadroj de instru- kaj fakekzerca instruado.



En Hungario dum la pasintaj 20-25 jaroj, pluraj libroj aperis, surskribite la historion de la diversaj manfaritaj punktoj, kaj prezentite ties preparateknikon kaj ornamar-trezoron. En la suba priskribo per kelkaj punkteknikaj konatigoj ni volas vekigi vian intereson.

## **KIO ESTAS LA PUNTO?**

Laŭ teksaĵhistoria determino: „La punkto estas tia trarompita, trupleza materialo, kies teksturo donas samtempe ankaŭ ĝian ornamon.”

Ĝi estas metiista kreitaĵo, farita per blankaj aŭ per koloraj fadenoj per pluspeca tekniko, kiu estas la plej bela ornamo de la vestaĵoj, loĝejaj kaj ekleziaj teksaĵoj.

Viroj kaj virinoj same ornamis siajn vestaĵojn per punkto, ekde jarcentoj. Tiuj servoj unue praktikan celon: defendante la teksaĵrandon de la disfadeniĝo, kio rilatas unuavice al la noditaj – kaj la metalfadenaj batitaj punktoj. Poste la praktika celo iĝis al ebleco de la arta kreitaĵo.

## **GRUPIGO DE LA PUNTOJ**

Ni povas fari grupigon laŭ plurspeciaj pensadsistemoj.

„En la fakinstruo de la punktopreparo” laŭ la preparateknikoj ni distingas:

- kudritan,
- batitan,
- plektuitan,
- retcan,
- noditan
- kaj aliajn permane faitajn punktojn.

El inter la denombritaj punktospecoj, - kiel artan punkton, do „originala” – rekonas la internacia fakliteraturo la manan en aero kudritan, kaj la batitan punktojn.

La ellevon de ĉi tiuj – unuflanke – motivas ties arta beleco, justigas ĝia laciga tekniko; - aliflanke – tiu grava rolo motivas ĝin, kiun ili plenigis en la vestaĵornamigo ekde la 16-a jarcento.

La bazmaterialo de ambaŭ art-punktoj estis la kotono, lano, or’- arĝent’- kaj ankaŭ silkfadeno.

### **Permane kudrita punkto (Ties multaj grupoj kaj specoj estas konataj)**

Kiel ankaŭ ĝia nomo montras, ĝia ilo estas la kudrilo. Oni fortigas la ŝablonon surpaperon desegnite, subŝtofas ĝin, poste oni plenigas la konturojn kaj la enajn intervaletojn per ornamkudreroj.

La punkto de Halas estas la plej grava reprezentanto de la hungara „enaero kudrita punkto”, kio elformiĝis en komenco de la 1900-aj jaroj.

Artaj planoj naskiĝis per secesiaj figuroj, en punktoplanoj de la desegnoinstruisto Dékány, Árpád. Marikovics, Mária iĝis tiu inventistino – ni povas nomi ŝin kuraĝe al tiu – kiu faris vere vivajn artverkojn el la ĝis tiamaj nerealigeblaj planoj. Ekde 1935, oni signas la verecon de punkto de Halas, per tri fiŝetoj, kiuj estas preparitaj per pli ol 50 speca kudratekniko.

### **Permane farita batata punkto**

Ĝi estas specialajn ilojn pretendanta punktospecio. Ĝiaj iloj estas: *batatkuseno*, kio estas laŭorde cilindra. Oni fortligas al ĝin la modelbazon. Oni bobenas la fadenon al pretigo de la

modelo, sur *batlignon*, kaj oni laboras per tekniko baziĝanta sur plekto, poste oni fiksas la krucigpunktojn kaj daŭrigas plu la laboron. Oni laboras samtempe per du paroj, kvar fadenoj.

La 19-a jarcentfino, la antaŭoj de la 20-a kaj 21-aj jarcentoj estas la etapoj de la akceliĝo de la batatpunto-faro: sur tuta teritorio de nia patrujo.

La edzinoj, fraŭlinoj - kaj memstare kaj en kooperativoj – grandnombre preparis kaj multoj ankaŭ planis rand- kaj enmetpuntojn, tablotukojn, kolumojn kaj ceterajn vestaĵkompletigaĵojn. Kelkaj regioneroj, kiel prepara centro kaj kiel stilcentro elformiĝis, ekzemple: Balatonendred-a, „Hunnia-punto”, Ŝubrikmaniera-batatpunto, „Gabóca-batatpunto de Sárköz” (Gaboca batatpunto en regiono Ŝarkoez) kaj la „Novstilaj-batatpunto” tukoj, kiujn oni preparis ekz: en Karcag kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo, en urbo Debrecen kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo, en Szentes (Senteŝ) kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo, en Abádszalók (Abadsalok) kaj en Csongrád (Ĉongrad).

### **Plektita punto (Sprang-tekniko)**

Ĝi povas esti la unua praa puntospecio, kies esenco estas la unu en la alian okazanta maŝligo de la vertikalaj fadenoj.

Oni certigas la model-elformiĝon per lignobastoneto, kio samtempe, samforme estiĝas supre kaj male. Antaŭ 100-150 jaroj, oni preparis virinkufon per plektita punto, en la norda kaj suda regionoj de nia lando.

### **Reteca punto**

La kien-aparteno de la reteca tekniko ne estis decidite definitive, ĉar ni povas vicigi ĝin kaj al brodaĵo, kaj ankaŭ al punto.

*La bazon de la reteca punto donas reto, kio povas pretiĝi:*

- 1, el kradon kreanta eltiro de la horizontalaj kaj vertikalaj fadenoj de la bazmaterialo, kiun oni fortigas per maŝokudreroj,
  - 2, el la per maŝofarado noditaj maŝoj, kiuj egalas kun tehniko de la fiŝkaptista reto.
- Post la retpreparo sekvas la enbrodo, enkudrerkudro; laŭ decidita modelo per diversaj ornamaj kudreroj, kreskaĵaj aŭ hom’-, bestfiguraj ornamelementoj.



Retecpunta virinkufo farita per orfadenoj

## Nodita punto

La kunŝpino-nodado de fadenoj, povas rekonduki nin al la deveno de la teksaĵmetio. Verŝajne ĝi estas same tiel malnova teĥniko, kiel la teksado. Ja oni devis fikse certigi la teksaĵrandajn fadenojn, ke la preta teksaĵo ne difektiĝu.

La homo – per sia belecsopiro, per sia mensevoluo en sia lerteco – progresis kaj kunligis la fadenojn ne nur konvene laŭ sia bezoneco, sed ankaŭ kreis plaĉemajn formojn. Ties-ĉi beleco igis taŭga la fadenfinojn jam ankaŭ al tio, ke ili iĝu ornamoj de la vestaĵoj. Ni vicigas ĉi tien ankaŭ la „ŝipo-punton” kiu iĝis konata laŭ la nomo: *frivolita punto*.

## Ceteraj mane faritaj punktoj

### 1, Kroĉetita punto

Kvankam la teksaĵhistorio ne vicigas ĝin inter la artajn punktojn, tamen oni devas ne preterlasi ĝin.

En la hungara teksaĵornamado: kiel ornama teĥniko estas trovebla preskaŭ en la tuta lando, ekde 150-200 jaroj.

### 2, Ŝnur-punto

La punkton ni preparas en du etapoj. La unua tasko estas: la kroĉo de ŝnuro bezonatas al la konturigado. Ni kudras per ornamaj kudreroj la model-elementojn ĉirkaŭitaj de sur la modelon suprenkuŝigita ŝnuro.

Mi esperas, per tiu-ĉi prezento mi vekis emon al ĉi bela metiista fako

Magdalena Mátray

Punto prezenton de Magdalena Mátray, esperantigis Adrienne, s-rino Pásztor

## Magdalena Mátray

### MIA FAKA AŬTOBIOGRAFIO

#### Lernado kaj instruo:

En 1983: mi komencis la lernadon de preparo de la permne farata – batata punto.  
1985-1989: mi instruis ĝin en la Kulturaj Institucioj de sep departementoj (Zala, Komárom, Veszprém, Fejér, Csongrád, Békés, Vas).  
1986-2000: mi instruis sisteme la motivojn de la hungaraj manfarataj-batatpunktoj: en Finnlando dum diversaj organizitaj kursoj.  
En 1987: mi prilaboris la studmaterialon de la grupgvidanto-instruo, apogita de la Hungara Kultura Instituto, krome ni ekzamenigis pli ol 30 lernantojn.  
1991-1999: mi instruis en la edukanta lernejo de la „Popola Ludo – kaj Malgranda Metio”, en Budapeŝto, kie mi prilaboris: la centran studmaterialon kaj ekzamenpostulojn de la „Puntoprepara Fakinstruo – deklaritaj en la „OKJ” (Landa Ŝtate Rekonitaj Ekzamenpostulatoj).

- En 1996: en Budapeŝto mi faris ekzamenon por fake instrui la „Puntopreparon”.
- Ekde 1998: mi estas nomumita fakspertulo, miaj fakterenoj estas: la Malpeza Industrio, en ĝi la teksaĵo.
- En 1999: mi faris „Vestaĵplanisto” ekzamenon en la Malpezindustria-ĉeflernejo en Budapeŝto.
- En 2000: mi faris fak-kvalifikan ekzamenon de loĝejinstalisto.
- Ekde 2003: mi gvidas la Instru-instituton de „Mátray-Ház” (Matrai-domo), en kiu daŭras la puntoprepar-fakinstruo kaj ekstera – puntofarinstrua ~~Plialtigita~~ multnivele lernejsistema – „OKJ”-a studuminstruo por plenkreskuloj.
- Ekde 2004: mi estas elektita ekzamenprezidanto en miaj fakterenoj.
- En 2005: en la Teknika Universitato: mi fakkvalifik-diplomiĝis kiel „Gvidanto de publikinstruado”. (Ekde 1981 mi estas inĝenier-instruisto)
- 2005-2006: mi partoprenis daŭre la „rajtharmonikigan laboron” de „OKJ”.

### **Mia laboro en la civilaj organizaĵoj**

- Ekde 1981: kiel kunfondinto mi partoprenas en la laboro de la Popolarta-Societo, poste Asocio, ĉitempe kiel prezidanto de la Faka Komitato de puntofarantoj.
- 1986-1989: mi estis prezidanto de la Komárom-Esztergom Departementa Popolarta Asocio.
- En 1990: mi fondis kaj 6 jarojn prezidante gvidis la Asocion de la Hungaraj Puntofarantoj.
- 1986-1994: mi estis laŭorda membro de OIDFA (Internacia Kudrita- kaj Batatpunto Asocio en Bruselo), poste de 1994 ĝis 2002 mi reprezentis Hungarion tie, kiel konsilantarano.
- Ekde 1998: mi partoprenis tiujn Internaciajn Eŭropajn Renkontiĝojn de Puntofarantoj, kies grava programo estis la kreo de la rete klare aperigebla Internacia Puntomuzeo (Ĉeĥio, Portugalio kaj Hispanio).
- 2000-2002: mi estis kontrolisto de la Luterana Eklezikomunumo de Komárom.
- 2001-2006: mi estis membro de la Konstru - kaj Ekleziarta Komitato de la Hungara Landa Luterana Eklezio.

### **Distingoj kaj ricevitaj premioj**

- En 1987: oni distingis min per emblemo „Pro la Socialista Kulturo” (Tatabánya).
- En 1987: mi ricevis la titolon „Puntofarista Popolartisto”.
- En 1988: mi ricevis „Orpremion”, en 1990 „Bronzo premion” de la Konkurso „Landa Vivanta —Popolarto” (Nyíregyháza).
- En 1992: mi ricevis oran- kaj arĝentan premion<sup>22</sup> dum la Puntoarta Bienalo en San-Sepolcro, (Italio).
- En 1995: Mi ekhavis la premion „Király Zsiga” (Kiraj Ĵiga), donacita de Asocio de la Landaj Popolartaj Societoj.
- En 1999: mi ricevis vivo-verko premion „Ora diplomo” de la Landa Metiista Ĉambro.
- La 5-an de Decembro 2001: oni distingis min per titolo „Honorcivitano de Bábolna”.
- La 20-an de Aŭgusto 2005 : mi ricevis Kabinetdistingon „Majstro de Popolarto”.
- La 23-an de Januaro 2006: La Hungara Komerca —kaj Industria-Ĉambro premiis miajn

kelkajn laboraĵojn per titolo „Hungara Metiartistaj Majstroverko”.

### **Ekspozicioj**

En 1988: Inaŭguriĝis mia unua memstara ekspozicio ( en Tatabánya, Hungario), kion sekvis pliaj 16 individuaj kaj grupaj ekspozicioj en Hungario (Bábolna, Bakonybánk, Békéscsaba, Budapeŝto, Gödöllő /Goedoello/, Kazincbarcika, Kisbér, Szeged, Székesfehérvár /Sekeŝfehervar/, Somogyvár /Ŝomodjvar/, Tata, Zalaegerszeg kaj en aliaj eŭropaj landoj (Aŭstrio, Belgio, Ĉeĥio, Finnlando, Italio, Portugalio, Hispanio, Svedio) kaj en Aŭstralio).

### **Publicaĵoj**

De 1987: mi daŭre studas kaj laŭsisteme ordigas la historiajn punktojn kaj ekde 1998 kun grupo de miaj lernantoj ni prilaboras tiujn.

En 1991: mi verkis libron per titolo: „Lernejo de la Puntobato.”

Ekde 1992: mi publikas daŭre en fakgazetoj (Mesterség és Művészet /Profesio kaj Arto/, Guzsalyos /Guĵajloŝ/, OIFDA bulletin, Horizont, Életfa /Vivarbo/).

### **Organizo de ekspozicioj, fondo de premio**

En 1994: Ene de nia familia Entrepreno (Mátray-ház Kft Bábolna) ni faris fondaĵon de la „Premio- Ora Punto”, kion ni disdonacas dum ĉiu dua jaro.

De 2006: Dum la lasta semajnfino de Aŭgusto ĉiujara, ni organizas la landan aranĝaĵon: „Festo de La Punto en Bábolna”; en la kadro de nia entrepreno per apogo kaj subteno de urbo Bábolna kaj civilorganizoj, individuoj.

### **Mia konvinko estas:**

LA PUNTO ESTAS REĜINO DE LA TEKSAĴMETIO, KIU ĈIAM SERVAS,  
KAJ NE REGADAS:

- ĜI SERVAS, ĉar per sia fajneco ĝi akcentas la belecon de la teksaĵo kaj akordiĝante kun la pluraj ornamteknikoj ĝi donas ties solenecon.

- ĜI SERVAS; ĉar per sia beleco montras la lertecon de la laboremaj manoj kaj la persistan paciencon de la pretigantoj.

LA TUTAN VIVON DE LA PUNTOFARISTOJ KARAKTERIZAS KAJ DIREKTAS TIU SERVADO kaj la dum laboremaj kreaĵoj naskita teksaĵmiraklo, la kreita objektiĝinta beleco.”

Bábolna, 26. 11. 2007

Magdalena Mátray  
Puntofaristo – instruisto  
„Majstro de Popolarto”

La fakan aŭtobiografion de sinjorino Magdalena Mátray,  
esperantigis: Adrienne, s-rino Pásztor



## FESTO DE SANKTA LADISLAO

„La ĉi-jara Varadinum-festo okazos inter la 24-27a de Aprilo 2008. La detala programo ne konatas momente, sed la ferma solenaĵo komenciĝos per solena meso la 27-an de Aprilo, en la Baziliko de Oradea. Ĉi tiun sekvos la procesio per la bustrelikvujo de Sankta Ladislao. (Ĝi ne identas kun la samnoma relikvujo konservata en urbo Győr).

Tiu ĉi estas preĝeja aranĝaĵo daŭranta dum la tuta antaŭtagmezo.

La aranĝaĵo (prizorgata de la historiaj eklezioj, sed ĉefe de la katolika eklezio) estas festo de la Hungararo de Nagyvárád (Oradea). Oni aranĝis ĝin unuafoje en la jaro 1992-a.

La datreveno 300-jara de la liberiĝo el sub la turka regado de la urbo kaj la datreveno 800-jara de la sanktuligo de la hungara reĝo I. László. (Ladislao la unua) donis okazon al la festado. Depost tiam oni aranĝas ĝin ĉiujare. Ankaŭ la geesperantistoj de Eger partoprenis ĝin antaŭ du jaroj.

- Ni havas ĉi tie, en Miskolc belan poemon de s-ro Dudich.
- S-ro Dudich pridonacis per ĉi tiu bela poemo ankaŭ la esperantistojn de Oradea okaze de lia vizito tien en 2005. Ĝi estas vere bela traduko ambaŭlingve.
- Mi konsentas pri la publikigo de mia raporto, ĉar tia maloftas ĉi tie.
- Mi dankas por la raporto.
- Volonte.
- Respekte: Attila Makay” (Oradea- Rumanio)”

(Kun s-ano Attila Makay leterŝanĝis kaj ties tekston esperantigis s-ino Adrienne Pásztor.)

**Takács Bernardin**  
**HIMNO AL REĜO SANKTA LADISLAO**

Ni jubilu gaje, Panonia gento,  
Sur liutoj niaj sonu inda sento,  
Ĝoj-kantanta atesto  
Pri Ladislao-festo.

Paganajn Hungarojn Stefan' kristanigis,  
En la eklezion roman li enigis.  
Ladislao devas zorgi,  
La kredon fidele gardi.

La tataroj fuĝigitaj de Hungaroj  
Ĵetadas monerojn orajn en aroj;  
Ladislao pie preĝas,  
Ĉiu oro tuj ŝtoniĝas.

Manĝi, trinki la soldatoj vane volas,  
La Sinjor' je reĝa peto jen miraklas:  
Cerv', bubalo are venas,  
El la roko akvo fontas.

Iri al la Sankta Land' intencis,  
Sed Dio la reĝon al ĉielo prenis.  
Dum tri jaroj Hungario  
Funebris pro Ladislao.

Al la tombo de la certe sankta reĝo  
Venadis la pilgrimar' kun preĝo:  
La sinjoro ĝin aŭskultis,  
Ili gracon ĝoj-rikoltis.

Gloro estu al Di'patro kaj la Filo,  
Kaj egale al tiu Sankta Spirito,  
Kies donacoj abundas,  
Se la reĝo intervenas.



*El la latina originalo tradukis  
Endre Dudich, 2004*

**Stefano Pál**  
**HISTORIO DE LA MIŜKOLCA ESPERANTO-MOVADO**  
**II. PARTO**

### **„Harmonio” – la unua Esperanto-grupo en Miskolc**

Sametempe, kiam en 1913 komenciĝis Esperanto-kurso en Miskolc, en Késmárk (nun: Kéšmarok) ankaŭ Ludoviko Király – instruisto de tiea mezlernejo – komencis kurson. Post la kurso li fondis grupon kun la nomo TÁTRA. Post la milito li ricevis postenon en Miskolc en la komerca mezlernejo. De 1920 dum kvar jardekoj direktis daŭre la Miŝkolcan Esperanto-movadon.

Li ekkonis la Miŝkolcajn esperantistojn, inter ili dr-on Ludoviko Győry Nagy, kiu jam ekde 1913 estis delegito de UEA, same kiel ankaŭ Ludoviko Király.

Fine de 1921 fondiĝis la unua Miŝkolca grupo, kiu portis nomon grupo „Harmonio” de Hungara Esperanto-Societo. Ties prezidanto estis Ludoviko Király. La grupo havis rondan stampilon, kiu ĝis nun konserviĝis. Anoj de la grupo renkontiĝis marde kaj vendrede de la 17a horo en la kafejo de la Hotelo Abbazia kaj dimanĉe inter la horoj 16-20. Sekretario de la grupo estis Mikelo Auer, advokato, du delegitoj de la grupo estis Stefano Győry Nagy kaj dr-ino Jolan Fodor Gózon, kuracisto.

Organizantoj de la grupo estis ankoraŭ Stefano Stuber, Ludoviko Szendy kaj Elizabeta Weinberger

### **Landa kongreso en Miskolc - la unua post la milito**

En aŭgusto 1922 la Miŝkolca gazetararo skribis la jenon: „La Miŝkolca Esperanto-movado tiel fortiĝis, ke la loka grupo „Harmonio” kuraĝis entrepreni la aranĝadon de tutlanda Esperanto-kongreso”. En la estraro de la ankaŭ laŭ eksteraĵoj impona kaj grandsukcesa kongreso prezidanto estis Ludoviko Király, vicprezidantoj d-ro Kolomano Kalocsay kaj d-ro Ludoviko Győry Nagy, ĉefsekretario Stefano Győry Nagy. Inter aliaj alparolis 18 reprezentantoj de hungaraj Esperanto-societoj, kaj Paŭlo Balkányi raportis pri la mondkongreso en Helsinki.

La oficiala gazeto de Hungara Esperanto-Societo detale konigis la programon, kaj raportis pri la okazintaĵoj. Artikoloj de Ludoviko Király kaj Johano Kozma faris bonan propagandon pri Miskolc.

La kongreso havis 214 oficialajn partoprenantojn, sed dum la arta vespero en la popolĝardena amuzejo ĉeestis 500 personoj. Grandan sukceson havis Julio Baghy, kiu estis aktiva partoprenanto de la tuta kongreso.

Valoraj memoraĵoj estas la esperantlingva, ilustrita verko de Ludoviko Király, kiu prezentas Miŝkolcon kaj ties ĉirkaŭaĵon kaj konigas la historiojn de Miŝkolca galantino kaj la 999 botistoj kaj ankaŭ epitaĵojn el la Avas-monta tombejo.

### **Artikoloj pri Esperanto – Lingvoinstruado**

En Miskolc informis pri Esperanto ne nur la montrofenestroj de librovendejoj. La Miŝkolcaj gazetoj jam en 1910 propagandis per novaĵoj, poste Béni Ferenczi, librokomercisto aranĝis ankaŭ libroekspozicion el esperantaj eldonaĵoj. En 1922 dum la semajno de la 4a landa kongreso ĉiutage estis Esperanto-kroniko en gazeto „Reggeli Hírlap” (Matena Ĵurnalo) inter la 23-26a de aŭgusto. La science valoraj artikoloj de Ludoviko Király/König/ estis grandsignifaj. Post la kongreso Ludoviko Király intensive faris la instruadon de la lingvo. De 1922 ĝis 1927 li gvidis multe da kursoj (por komencantoj kaj progresantoj). Lia eseo „Ĉu ni instruu Esperanton en mezlernejoj?” iĝis fama.



En 1926-27 li gvidis tre vizitatajn kurson en du klasoj kun 250 partoprenantoj. Dume inter la jaroj 1923-27 li estis aktiva partoprenanto de kvar mondkongresoj.

Dum la 50 jara esperanto-agado de Ludoviko Király aperis de li pli ol 1 180 diversaj hungaraj esperantlingvaj artikoloj, eseoj en diversaj gazetoj. Inter la jaroj 1923-1961 li estis delegito de UEA. Ludoviko Kőkény skribis en sia rememoro en februaro 1961, ke ankaŭ li dum porpedagoga kurso de Ludoviko Király ellernis la lingvon, kiam li loĝis en Miskolc kaj instruis tie en la komerca mezlernejo, poste dum 15 jaroj en la stenografia kaj tajpista faklernejo. En Miskolc li laboris ankaŭ kiel ĵurnalisto. Ĉi tiu eminenta, elstara literatura, gazetredaktista personeco de la hungara Esperanto-movado volonte vizitis dum longaj jardekoj al Miskolc ankaŭ kiel preleganto.

### **Miŝkolcaj laboristaj esperantistoj (1924-1944) De grupfondigo ĝis malpermeso**

#### **Societo de la laboristaj esperantistoj - Malpermesitaj ideoj.**

La unua Esperanto-grupo de Miskolc ne estis longviva. La cirkonstancoj estis tiaj, ke ĝi ĉesis fine de la 1920aj jaroj (1927). Sed la urbo ne restis Esperanto-grupo. La flagon de la movado pluportis ekde 1925 tiuj, kiuj iĝis anoj de la Societo de Hungaraj Esperantistaj Laboristoj fondita en 1913. Ĉi tiu societo aŭdigis sian voĉon ankaŭ dum la unua mondmilito. En 1924 fondiĝis en la lando 11 grupoj, ankoraŭ en 1925 pluaj ses, la 17a grupo estis tiu en Miŝkolc, kiu havis 30 anojn. La nombro de la grupoj de la laboristaj esperantistoj kreskis en 1929 ĝis 30 kun 1500 membroj. En la gazeto „Népszava” kaj sindikataj gazetoj ĉiam pli multaj artikoloj, informoj, propagandaj aperis.

Oni konsideris ankaŭ la agadon de la Esperanto-societo en Miskolc kiel laboristan klerigadon en februraro 1925, kiam oni komencis la unuajn organizajn aktivadojn. La 22-an de aprilo oni invitis la interesigantojn por fondiĝa kunsido. La komunaj kunvenoj okazis en legejo de la gazeto „Reggeli Hírlap”. Jam en novembro oni aranĝis ekspozicion. Sed komence de 1926 la urbestro ne aprobis la statuton de la societo.

La gazeto „Reggeli hírlap” amare konstatas: „Inter la Miŝkolca laboristaro ne estas permesite disvastigi la ideojn de Ludoviko Zamenhof.”

#### **Malpermesita societo - 50 pengoj (pengó=malnova hungara mono)**

Tutlande funkciis la Esperantista Societo de Hungarlandaj Laboristoj kadre de la Socialdemokrata Partio, sed en la 20-aj jaroj ĝi venis sub la influon la Hungarlanda Partio de Komunistoj. Jam de 1927 ne estis sendanĝera la partopreno en la movado, kiu estis malfaciligita pro la policistaj persekutadoj.

En 1927 estis la rezidejo de la Miŝkolcaj laboristaj esperantistoj la Ferlaborista Kulturdomo „Vasas” kulturdomo sur la placo Deák. Ĉi tien oni sendigis la eksterlandajn kaj hungarajn revuojn. La 1-an de aprilo 1927 oni malpermesis la revuojn „Sennaciulo” kaj „La lernanto.” Ĉe kiu oni trovis malpermesitajn esperantlingvajn literaturaĵojn, tiun atendis aresto, hejma aresto, monpuno aŭ enkarcerigo. Tio okazis ankaŭ en Miskolc, ja ĉi tiuj gazetoj atingis ankaŭ Adalberton Lehóczky, kiu estis sekretario de Miŝkolca grupo de la societo. La polico konfiskis ĉiujn eldonaĵojn, librojn kaj li estis kondamnita dektaga malliberigo aŭ 50-penga monpuno.

Sed la Miŝkolcaj laboristaj esperantistoj ne ĉesigas la funkciadon malgrau tio, ke la policistĉefo ne rekonis la fondiĝon de la grupo. Ili aranĝis prelegojn, kiujn oni vizitis ankaŭ de aliloke. Oni aranĝis deklamvespersojn kaj kursojn ĉe la konstrulaboristoj, ferlaboristoj,

presistoj. Ili aktivis ankaŭ en Diósgyőr kaj Pereces. La kurson en la Kossuth-strata rezidejo la la polico ĉesigis. Oni devis peti permeson por aranĝaĵoj, kaj prezenti la liston de kursanoj al la polico.

En 1928 fondiĝis la kulturasocio de la organizitaj laboristoj, inter kies membroj oni elektis plurajn esperantistajn reprezentantojn. Tiel oni mildigis la ŝarĝon de neleĝeco.

### **Refondiĝoj - 23 laboristoj**

Inter 1929-1931 ankaŭ tutlande malpliigis la movada aktiveco de laboristaj esperantistoj, sed post kvar jaroj en Miskolc ili denove organiziĝis. La 13-an de novembro 1932 oni aranĝis refondan kunvenon kun delegitoj de esperantistoj el Budapeŝto kaj Eger, sume 20 personoj. La kunsidon prezidis Adalberto Lehóczky. En ĉi tiu jaro ekzistis 33 grupoj. Rezidejo de la Miŝkolca grupo estis sub nr.2. str. Rákóczi. Sed la funkciadon de la grupo oni denove ĉesigis, ĉar la 4-an de januaro 1934 oni denunciis al la Miŝkolca polico, ke 14-an de januaro oni aranĝos ĝeneralan kunvenon en la konstrulaborista hejmo en strato Kun józsef.

Al la refonda kunveno venis Ladislao Berg el Budapeŝto kiel delegito. Lian prelegon aŭskultis 16 personoj kaj oni elektis estraron. 23 anoj de la Miŝkolca grupo havis membrolibrojn. Ĝi havis 20 virajn kaj 3 virinajn membrojn. Laŭprofesie ĉiuj estis laboristoj: 5 seruristoj, 3 tajloroj, 2 lignaĵistoj, 2 ŝoforoj kaj je 1 lokomotivestro, bindisto, tornisto, spicaĵisto, enkasigisto, masonisto, remburisto, verŝisto, frizisto.

### **La ministro de internaj aferoj decidas - fino de la societo**

En la membrolibroto n-ro 6263 de Adalberto Lehoczky ne estas gluitaj markoj por la jaro 1934 kaj ankaŭ por la pluaj jaroj mankas membromarkoj. Kiam la 14-an de januaro 1934 refondiĝis la Miŝkolca Laborista Esperanto-Grupo, jam pretiĝis la raporto de la politika detektiva ĉefgrupo de la polico en Budapeŝto. La ampleksa skribaĵo taŭgus ankaŭ kiel Esperanta movadhistorio, kun aparta konsidero de la laborista Esperanto-movado. Surbaze de tiu ĉi raporto decidis la ministro de internaj aferoj en sia dekreto n-ro 177.338/1934.VIII de la 9-a de Aprilo 1934, ke li malpermesos, disigos ĉiujn laboristajn Esperanto-grupojn – ankaŭ la Miŝkolcan –, kaj konfiskos ilian havaĵon.

Ĉi tiun dekretan anticipis la Hungara Socialdemokrata Partio la 14-an de februaro 1934, ĉar ĝi rifuzis ĉiun komunecon kun la Societo de Esperantistaj Laboristoj, kaj alvokis la laboristojn ĉesigi sian membrecon en la societo.

La 22-an de februaro 1934 la Budapeŝta centro de la Societo de Esperantistaj Laboristoj sendis leteron al siaj grupoj. En ĉi tiu ĝi nomis kalumnio la decidon de la 13 de Februaro de la partio, laŭ ankaŭ la estraranoj estas eksigitaj. Tiam okupis 25 detektivoj la Dob-stratan centron de Laborista Esperanto-Societo, kaja arestis ankaŭ la personojn nomitajn en la gazeto „Népszava”. Ĉar oni ne trovis kulpigajn pruvojn, ili estis liberigitaj.

La malpermesado de la societo kaj la grupoj estis granda perdo por la lando kaj la Esperanto-movado de Miskolc. Ĉi lasta reviviĝis nur post 1945.

- daŭrigo sekvos -

**Adrienne, s-rino Pásztor**  
**Naturmigrado al Szentlélek (Sankta animo)**

De la miŝkolca Tiszai (Tisai) Fervojestacejo per tramo numero 1 vojaĝante, dumvoje ni preterpasos la tn Strandbanejon de *Selyemrét* (Ŝejemret/Silka kampo). /De la Tisai F.S. trafikas ankaŭ aŭtobuso n-ro 1, sed ĝi veturas iome alivoje, ankaŭ per tiu aŭtobuso n-ro 1 ni povas vojaĝi ĝis la tramfinhaltejo de Diósgyőr (Dioŝdjoer)./

Iam sur tiu teritorio funkciis silkofabrika kaj la freŝteksitajn malsekajn silkojn por sekigi oni metis sur la herbejon de tiu loko. De tie devenas ĝia nomo.

Multoj volonte vizitas ties *strandbanejon* pro ĝia 32-35 C grada varmakvo kaj la agrabla kaj komforte elformigita teritorio.

Dekstren de la t.n. Szinvapark (Parko apud la rivereto Sinva) estas la tn. *Búza placo* (Tritik-placo), apud kiu haltas la aŭtobuso n-ro 1. Tiu-ĉi estas unu foirtereno de la urbo. La plilarĝigo de la artobjekto: foirĉambrego nun okazas, la urbestro nun modernigas ĝin. De tiu Tritik-placo ekiras la aŭtobuso n-ro 2 al Miŝkolc-Tapolca, kie kun multaj ceteraj vidindaĵoj, la Terma- kaj Grotbanejo logas la vizitantojn. Pluveturante per tramo tra la strato Széchenyi, dekstre ni vidos la *Teatron Déryné*, kiu estis la unua el ŝtono konstruita teatro de la lando. Maldekstre ni povos vidi la *Malhelpordon kaj Domon de Rákóczi*, poste ni ekvidos la monton Avas, flanke kun vicoj de vinkeloj, la *Kalvinanan preĝejon kun la tombejo kaj la muzikhorloĝan sonorilturon, kaj ankaŭ la elvidturon* (nokte bele lumigitan). same maldekstre videblas la Muzikpalaco (Muzikinstruejo). La malnova nomo de la placo Sankta Anna, estis Placo-Esperanto, sed pro peto de la eklezio, ĝi suferis trabaptiĝon.. Anstataŭ ĝi sur la aliflanko de la tramrelvojo estas la *Esperanto-Park* (Parko Esperanto). Apud ĝi staras domegoj. Sur iu altdom-muro ni trovas *Esperanto memortabulon* hungarlingvan, levitan en 1957.

aŭtobuso

Pli poste maldekstre ni povas vidi la *fortikaĵon de Diósgyőr*.

*De la tram-finhaltejo* ni pluveturos per aŭtobuso nr-o 15 kaj povos rigardi la restaĵojn de la iama klostro de Paŭlanoj. Maldekstre poste sekvos la *Paperfabriko*, dekstre la vojenkonduko al terenoj de libertempopasigo, sporto kaj Zoo de la *Majális-park* (Majfesta parko). Post tiu ĉi maldekstre sekvos la *Molnár Csárda* (Muelista Ĉardo kiu estas restoracio havante sian nomon pri la popolfabela malriĉa muelisto, kiu ekamis la filinon de la riĉa bienhavanto) kaj la *Grimp-Roko* (kie la rokgrimpantoj kutimas sinekzerci). Poste, nelonge maldekstre malantaŭ la arboj ni povos ekvidi la hotelon *Palaco*, (kiu estas la plej bele situanta hotelo de la lando), la ĉirkaŭ ĝi estantan *terasán parkon kun akvofalo*. Poste ni atingos la *lagon Hámori*, kiun oni elformis per la ŝveligita akvo de rivereto Garadna, kiu trafluas la valon. Ĉi loke disbranĉiĝas, ekkondukas la vojo al Ómassa (Malnovmaŝsa). Ĝis la finhaltejo ni vojaĝas en proksimeco de la lago, sur la landvojo. Kvankam ni elekteblas ankaŭ turistvojon promenante sur la sama vojo apud la lago.

Maldekstre ni povos rigardi la industrialan memoraĵon *Óskohó (Praa Ferfandejo) de Újmassa kaj ĝian Metalurgian –Muzeon*.

Same maldekstre ni povas aliri la trutbredejon, de kie oni provizas la tutan Bükkmontaran akvofluaron per trutidoj. Sur ties teritorio oni manĝeblas samloke bakitan truton. Samflanke troveblas la finhaltejo de la Lillafüreda Arbara Fervojo en Garadna. Belaj turistvojoj kondukas de tie al Jávorkút, Szentlélek, Bánkút..

De la konstruaĵo de Ómassa, - montrita sur la foto nr-o 1, - kondukas la turistvojo: signita per blua-blanka strioj, kiu donas multajn ĝojojn ĉiusezone per sia trankvilo kaj per la magia beleco de la ĉirkaŭbrakumanta naturo. Etrojo lirletas apud la turistvojo.. Ĝia akvo estas kristalpura. Ĉiusomere, super ĝi flugetantaj odonatoj estas observeblaj, kaj verdaj lacertoj venantaj al ĝi por trinki. De printempo ĝis aŭtuno floradas la plej diversaj sovaĝfloroj. Ni

rigardas pinojn, sed kiel arbaron kreantojn: fagarbojn, alnon, aceron, kverkon – pli malsupre kornusarbedon, rubusveprejon. Jam kreskas la arbidoj sur lokoj de la dehakitaj arbaroj, kaj multas la arbara fragario. Ĝiaj dolĉaj, bonodoraj fruktoj meritas la subenfleksigon al ili. En la sekfoliaro foje-foje aperas bruna bufo. Ni devas atenti ne surpaŝi ĝin, ĉar tie ĝi hejmestas. Foje trakuras antaŭ ni cervido, leporo. La arbarprofundo kaŝas kotbanejon de apro.

Progresante sur la signita vojo, ni povas enspiri odorojn de fungoj, kaj de la falintaj kaj sekputriĝantaj arboj. Ni povas admiri la birdojn multspeciajn. Ni respondeblas al fajfosignoj de iliaj etaj bekoj. Se ni atentis silente, ni povos gvati, kiel laboras la ruĝkapa pego.

La Paŭlanoj ricevis ĉi lokon ĉ. en 1310, kaj ili konstruis monaĥejon ĝis jaro 1346. El la iam 10x8 metroj area klostro nun orfadas nur kelkaj murrestaĵoj. Sed ĝiaj aŭdac-elanaj ŝtonpilieroj ŝajnigas pripensi la iaman belecon de la klostro. Ni promenantе sur ĉi vojo, dum unu horo atingas la ruinojn de la *Paŭlana-Klostro kaj la Turistdomon de Sztlélek (Sankta animo)*.

Sed la freŝmov-kapablaj gejunuloj bezonas nur 30-40 minutojn al la vojplenumo.

La bildojn kaj ĝiajn tekstojn sendis samideano **László Simcsik (Ladislao Ŝimĉik)**, la proponanto de ĉi naturmigradvojo:



1. **Foto nr-o 1.** En Ómassa, apud la drinkejo Vadász (Vadas/Ĉasisto) jen estas la Turistdomo de la BAZ-departamenta Naturamika –Societo. De ĉi domo ni ekiras.



2. **Foto nr-o 2:** Post la unua vojkruciĝo ni devas plui sekvente la blujn-krucvojan turist-signojn.



3. **Foto nr-o 3:** La Fonto Jubileo videblas tie, en 1985 estis farita ĝia fontokapta virko.



4. **Foto nr-o 4:** Tie la benkoj videblas, kiuj staras en la fonto-apudeco. Sed ne staras jam la iama ligna alpa-tegmenta dometo konstruita por ŝmiri nin kontraŭ pluvo, antaŭ 35 jaroj.



5. **Foto nr-o 5:** Post la fonto ni aliras vojkruciĝon. Ni devas pluiri sur la vojo signita per blua kruco. La ruino de Paŭlana Klostro troveblas iom antaŭ Szentlélek.

Agrablan Migradon en la Naturo!

**Hungara – Esperantista – Pola Renkonto**  
**Abaujszántó – Miŝkolc – Lillafüred**  
**La 4, 5, 6-an de Aprilo 2008**

Karaj niaj legantoj!

Kiam ni parolas pri vojaĝo, ni ne povas forlasi la karajn rememorojn, devas paroli pri tiuj. Same okazis ankaŭ nun, tiel la nuna numero de NHI, ŝajnas kiel vojaĝa - magazino. Ni prezentas la adiaŭajn vortojn de nia atestimata samideanino **Halina Komar**, prezidantino de la Pola Esperanto-Asocio, kiu vizitis nian regionon kun siaj Esperanto grupanoj kaj kun grupo el Universitato de urbo Łodz.

Jen, ŝiaj vortoj, skribitaj kaj transdonitaj al ni en memorlibreton, je adiaŭo, la 6-an de Aprilo 2008.

„Neesprimebla gastemo, grandega koreco, la plej riĉa programo kiu povis esti realigita dum nia tri taga restado en Hungario – ĉio ĉi supra atendis nin en Abaujszántó, Miskolc kaj ĉirkaŭaĵoj, danke al la Abaujszántó-anoj (vicurbestro László Lipták kaj la direktorino de Kulturdomo: Imola Széphalmi sinjorino Burkus), d-ro László Molnár (el urbo Sárospatak), s-ino Margareta Evva (el urbo Encs), geedzoj Adrienne kaj László Pásztor, sinjoroj D-roj Endre Dudich kaj György Nanovfszky kaj la Studenthejmo de la miskolca Gimnazio „Lévay”! Neniam ni forgesos la belegan ekskurson de polaj esperantistoj, kiu okazis la 4-5-6-an de aprilo 2008. Kaj neniu el ni povos forgesi vin: Adri kaj László.

**Korege – Halina Komar Nowy Sącz”**

□

Pri la akcepto de niaj polaj gastoj en urbo Abaujszántó, skribis ankaŭ sinjoro d-ro László Molnár. *Jen, vi povas legi sur la sekva retejo:*

**Molnár László " Home page for molnar**

**[http://www.liberafolio.org/Members/molnar/index\\_html](http://www.liberafolio.org/Members/molnar/index_html)**

□

Kaj nun bonvolu legi raporton de HALINA KOMAR, de prezidantino de PEA.

**“Hungar’, Polo – fratoj estas  
glavo, glaso jen atestas!**

## INTERKULTURA DIALOGO

Dum la unua aprila semajnfino, danke al la invito de niaj hungaraj E- amikoj, geedzoj Adrienne kaj László Pásztor el Miskolc /Miŝkolco/, ni povis aranĝi la tritagan ekskurson al Norda Hungario. La renkonto estis planita de PEA, kiel programero de Eŭropa Jaro de Interkultura Dialogo, kaj celis komenci la dialogon en tre ĝusta loko, ĉar la Nordhungaria regiono estas vera miksaĵo de diversaj kulturoj – nacioj, religioj, lingvoj, kutimoj...

Plena buso veturigas esperantistojn precipe el Nowy Sącz /Nova Sonĉo/, sed aranĝon partoprenis ankaŭ ekskursanoj alvenintaj el Kraków /Krakovo/, Staszów /Staŝovo/, Łódź

/Lodzo/, Wrocław /Vroclavo/. Inter ili estis 5 estraranoj de Ĉ.E. de Pola Esperanto-Asocio kaj 2 estraraninoj de ILEI – Pola Sekcio.

Kunvojaĝis ankaŭ Prezidantino de Sandecia Universitato de Tria Aĝo, s-ino Wiesława Borczyk, kiu estas la pasintjara venkintino de la reta plebiscito de FREŜO en kategorio „Amiko de Esperanto”, egale kun d-ro Truskolaski, Prezidanto de la urbo Białystok /Bjalistoko/. Ŝi vere meritis ĉi titolon, ĉar ŝi permesis enigi Esperanton al la UTA (Universitato de Tria Aĝo), per kio tre pligrandiĝis kaj plifortiĝis la loka kaj regiona E-movado. Ankaŭ ŝia projekto pri la Tutpollanda Federacio de UTA, povas iniciati la saman proceson en multaj federacigitaj universitatoj.

Gesinjorojn Adrienne kaj László Pásztor mi ekkonis persone dum 100-jara Jubileo de Esperanto en la slovakaj urboj Martin. Tio kaŭzis la komencon de nia korespondado kaj poste – interŝanĝo de la eldonitaj ambaŭflanke revuoj: NHI /Nordhungaria Informo/ kaj Pola Esperantisto, nune prilaborata en Nowy Sącz. La reta gazeto el Miskolc atingis legantojn /ĉ.700/ el 5 kontinentoj, dum la nova Pola Esperantisto – post du numeroj – jam ankaŭ sukcesis trovi abonantojn de Japanio ĝis Brazilo!

Ni estas vere kontentaj pro interkonatiĝo, kiu pliriĉigas esperantistajn rilatojn ambaŭ flanke.

Ilia bonkora invito donis eblecon al la pola esperantistaro travivi neforgeseblan aventuron kaj ankaŭ montri al eksteruloj, ke la plej taŭga por ĉiu internacia kontakto estis-estas-estos nia lingvo Esperanto.

Dum la aranĝo ĝi fariĝis vera ponto inter niaj tute diversaj lingvoj, permesante realigi la abundan programon de vizitado, sed ankaŭ personajn interparolojn de poloj kun hungaroj.

Tre riĉa programo preparita de Adri kaj László enhavis:

- la specifajn esperantajn erojn kiel ekzemple florkronadon de la muzea memorĉambro de Kálmán Kalocsay /Kolomano Kaloĉai/ en Abaujszántó /tabulo kaj postumento/, kaj ornamon de Zamenhofa tabulo en Miŝkolc pere de E-simboloj /ĉie kunportitaj kaj montritaj, fotitaj verdaj flagoj kaj E-signoj/
- alvenon de esperantistaj eminentuloj - Honoraj Prezidantoj de Hungara Esperanto Asocio - *d-ro Endre Dudich kaj d-ro György Nanovfszky* al renkonatiĝo. La unua estas ankaŭ Honora Membro de UEA. Renkontiĝis kun ni ankaŭ la esperanto-instruisto *d-ro László Molnár* emerita profesoro de Instruistojn Eduka Ĉeflernejo de Sárospatak (Ŝaroŝpatak), kaj sinjorino *Imola Széphalmi, Burkuŝ*; la direktorino de Kulturdomo de Abaujszántó (kaj la aranĝantino de Kalocsay festetoj de flanko de Abaujszántó), krome *Evva Margit* (el urbo Enĉ); de 40-jaroj gvidantino de polaj grupoj kaj kunlaborantino de Andrzej Grzębowski el Bydgoszcz.

La turisma programo konatigis nin kun diversaj tieaj kulturoj. Ni vizitis la plej malnovan kalvinanan preĝejon sur la monto Avas, rigardis la grandiozajn ortodoksajn trezorojn de la preĝejo de Sankta Triunuo kaj apudan Ortodoksan Muzeon, la plej gravan kaj riĉan en Hungario, kaj partoprenis /ho, kia surprizo!/ pollingvan dimanĉan Sanktan Meson, kiun celebris por nia grupo la pola pastro Adamczyk, naskita proksime al Nowy Sącz!

Krom la historia parto de renkontprogramo, ni havis eblecon paroli pri aktualaj aferoj de nia komuna Eŭropo, pri niaj regionoj kaj pri agado de neregistritaj organizaĵoj. En Abaujszántó Vicurbestro bonvenigis nin kaj regalis per kutima, hungaria tagmanĝo – gulaŝo, vino, kukoj „strudloj”, bonega kafo. Post kunaj toastoj kaj tuja ekamikiĝo, ni interŝanĝis adresojn, kun bona volo komenci kontaktojn ankaŭ inter regionaj registaroj. Esperantistoj ambaŭflanke pretas helpi lingve priparolojn kaj interkonsentojn de kunlaboraj kondiĉoj.

Venis ankaŭ por saluti nin reprezentantino de la Miŝkolca Urba Estraro. Ĉi tage ŝi partoprenis la kunvenon kun delegacio el Katowice, la urbo jam kunlaboranta kun Miskolc, do nuna nia tasko estos provi konstrui la similan kunlaboron inter la registaroj de Nowy Sącz kaj Miskolc!

La ambaŭ urboj estas similaj pro la multkultureco de regionoj, pro la kuracloka karaktero, pro la specifa gastigemo de la loĝantoj. Do nur bezonata estas bona volo kunlabori, kiun ni – esperantistoj – havas, eĉ tro!

Ne eblas forgesi pri la programeroj ĝuigantajn niajn korpojn – tio estis multhora banado en belega, grandega „Grotbanejo” en Tapolca. Tie, en la kalkŝtona groto, oni faris mondfaman banejon kun nature varmaj kaj kuracigaj akvoj.

Post longa banado ni vespermanĝis en proksima, ĉasista restoracio, kie atendis nin abundo de freŝe bakitaj diversaj viandoj, la bonega vino - Tokaji, cigana muziko... Kaj dancoj, kaj kantoj: hungare, pole, esperante!

**Kompreneble, ke dum la tuta tritaga aranĝo, regis la lingvo Esperanto, ankoraŭfoje konfirmante, ke ĝi ebligas diverstemajn kaj diversnivelajn kontaktojn, kaj ke ĝi estas la plej taŭga ilo kaj rimedo por interkultura dialogo en Eŭropo kaj en la mondo. Ni tion ja bone scias, sed per tiaj kaj similaj aranĝoj, kiuj engaĝigas ankaŭ eksterulojn, ni montras, ke Esperanto povas servi al gravaj celoj kaj aferoj.**

**Eŭropa Unio sentas la bezonon kaj konas la problemojn de unia multkultureco, do pro tio atentis ĉi jare pri ĉi temo.**

**Ni uzu la ŝancojn de Eŭropa Jaro de Interkultura Dialogo, por ĉie montri, konfirmi per diversaj, eksteraj kontaktoj, la plej taŭgan rimedon por la interkompreniĝo kaj dialogo - E s p e r a n t o n !**

Aldone:

Indas specialaj dankoj al tre karaj gesinjoroj **Adrienne kaj László Pásztor**, kiuj dum multaj semajnoj bonvole laboris por prepari la aranĝon: ili elektis, tradukis, presis abundajn informajn materialojn por ĉiuj /!/ partoprenantoj, ili aranĝis la tuton perfekte, ligante samtempe niajn rilatojn kun la loka registaro, ebligis ankaŭ interkonatiĝon kun esperantistaj eminentuloj el Budapeŝto, kaj „kiel gepatroj” zorgis pri komforto de la restado kaj realigo de la tuta programo.

Ilian bonvolemon kaj bonkorecon, pretecon por tuj servi al aliaj homoj sentis la partoprenantoj de la aranĝo kaj priskribis en aparta kajero.

**Dankegon al Vi niaj amikoj, grandaj kaj veraj Esperantistoj - por Via agado kaj Viaj koroj!**

Halina Komar, Prezidantino de Pola Esperanto Asocio”

□

Karaj niaj legantoj!

La fotojn de la Hungespola Renkonto, vi povos rigardi sur la retpaĝo, se vi surklakos la ruĝan butonon, laŭnome “Pola Renkonto”.





Hungara Esperantista Pola Renkonto en urbo Abaujszántó



Vizito en Miskolc, ĉe la memortabulo de L.L. Zamenhof.



## **NORDHUNGARIA INFORMO**

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Király u.25. 2/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Tel.: + 36 70 570 8895

Retpošto: [pasztor.laszlo4@chello.hu](mailto:pasztor.laszlo4@chello.hu)

Retpaço: <http://kiralylajos.extra.hu>

MSN: [pasztor.laszlo4@chello.hu](mailto:pasztor.laszlo4@chello.hu)